

John Ellerton, Finiĝas nun alia tago	John Ellerton, Ni estis ja en mano Dia	John Ellerton, Forpasis tiu tag', Sinjoro	John Ellerton, The day Thou ga- vest, Lord, is ended
--	--	---	--

*tradukita de Wil-  
liam John Downes*

*tradukita de Manfre-  
do Ratislavo*

*tradukita de Frieder-  
Weigold*

- |  |  |   |  |
|--|--|---|--|
| 1. Finiĝas nun alia<br>tago,<br>jam venis la vespera<br>hor'.<br>Kunvenis ni por ad-<br>orago<br>plaĉanta al la Di-<br>Sinjor'           | 1. Ni estis ja en mano<br>Dia,<br>dum brilas super ni la<br>Sun'.<br>Protektu nin per ma-<br>no Via<br>dumnokte, Dio, an-<br>kaŭ nun!              | 1. Forpasis tiu tag',<br>Sinjoro,<br>Kaj profundiĝas la<br>senlum'.<br>Vi gardis nin de ajn<br>doloro.<br>Nin gardu ankaŭ<br>dum noktum'! | 1. The day Thou gavest,<br>Lord, is ended,<br>The darkness falls at Thy be-<br>hest;<br>To Thee our morning hymns<br>ascended,<br>Thy praise shall sanctify our<br>rest.               |
| 2. Ni dankas Vin,<br>Savanto nia,<br>ke sur la tuta mond-<br>teren'<br>la sankta eklezio<br>Via<br>staradas firme ĉe<br>posten'.         | 2. La ter' cirkulas ĝis<br>la veno<br>de l' nova tag', ripoz-<br>as ni<br>dum tiu nokt' en Via<br>beno <sup>2</sup><br>ĝis la mateno, kara<br>Di'. | 2. Ni rotacias en la<br>tagon.<br>En nokta paco dor-<br>mas ni.<br>Kaj portas lumon<br>trans la maro<br>La suno, kie brilas<br>ĝi.        | 2. We thank Thee that Thy<br>church, unsleeping,<br>While earth rolls onward into<br>light,<br>Through all the world her<br>watch is keeping,<br>And rests not now by day or<br>night. |
| 3. Ruliĝas tero, bri-<br>las lumo<br>de ne-ĉesanta<br>maten-glor'.<br>Leviĝas laŭdo, preĝ-<br>parfumo<br>konstante, kiel dolĉ-<br>odor'. | 3. Nun kiam en mal-<br>hel' fordronas<br>la Sun' en tiu ĉi ves-<br>per',<br>multvoĉe Via laŭdo<br>sonas<br>alialoke sur la Ter'.                   | 3. Senĉese kiel la<br>mateno<br>Briladas super tera<br>rond',<br>Eksonas laŭdo pro<br>la beno<br>Al ĉiu sur la vasta<br>mond'.            | 3. As o'er each continent and<br>island<br>The dawn leads on another<br>day,<br>The voice of prayer is never<br>silent,<br>Nor dies the strain of praise<br>away.                      |
| 4. Ekdormas ni post<br>sun-subiro;<br>gefratoj en la okci-<br>dent'<br>vekiĝas kun novtag-<br>aspiro<br>Vin glori per viv-<br>elokvent'. | 4. Ĉar kiel estas<br>ĉirkaŭanta<br>la Teron lumo de l'<br>maten',<br>senĉese estas pluso-<br>nanta<br>preĝado de la homoj<br>jen.                  | 4. La suno, kiu ĵus<br>subiris,<br>Ja brilas en plu fora<br>land'!<br>La gloron, kiun ni<br>admiris,<br>Anoncas plu<br>preĝada kant'.     | 4. The sun that bids us rest<br>is waking<br>Our brethren 'neath the we-<br>stern sky,<br>And hour by hour fresh lips<br>are making<br>Thy wondrous doings heard<br>on high.           |
| ...  | ...  | ...   | ...  |

<sup>2</sup>aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

5. Formortos mon- daj imperioj, sed Via regno kres- kos plu. Al Vi sin cedos di- nastioj, Venkinto estos vi, Jesu'!	5. Ja estas, Dio ĉiopova, senlima Via regno, nin konduku al la tago nova en Via regno je la fin'!	5. Pereas regnoj. Tiel estu! Kaj sole staras via tron', Ke sole via regno re- stu Je fina tag' sub unu kron'.	5. So be it, Lord; Thy throne shall never, Like earth's proud empires, pass away: Thy kingdom stands, and grows forever, Till all Thy creatures own Thy sway.
...	...	...	...

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de WILLIAM JOHN DOWNES (\*1892 - †1987).

Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)

Tiu ĉi traduko aperis en la Ekumena Diserva Libro "Adoru", eldonita en 2001 de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj Kristana Esperanta Esperanto-Ligo (KELI), kanto numero 153.

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de MANFRED RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-01-10.

Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.

Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)

Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro "Gotteslob" (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Ves\\_er\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).

Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 - †1893-06-15), publikigita 1870.

Arg-130-255 (2008-11-08 14:47:39)

Information about the author can be found on the website [http://www.cyberhymnal.org/bio/e/l/l/ellerton\\_j.htm](http://www.cyberhymnal.org/bio/e/l/l/ellerton_j.htm).